

Venontaj kunsidoj:

- Lu, la 2-an de marto
Gramatikaĵoj
- Lu, la 6-an de aprilo
Markus Zans prelegos ...
- Lu, la 4-an de majo
M.-Antoinette prelegos ...
- Sa, la 20-an de junio
Ekskurso

Kunsidoj normale okazas ĉiumonate ĉe Espace Dickens. rue Dickens 6, Laŭzano

Lunde, la 3-an de februaro, je la 20-a Ĝenerala Asembleo

Meze de la mondo

Ĉu vi konas la mezon de la mondo? Estas loko, kie la akvoj fluas suden al *Rhône* kaj norden al *Rhin*.

Ĝi troviĝas proksime de la rivera valo "Nozon" kaj la montaro "Mormont", loko nomita *La Sarraz*, kie vojo iras de la direkto de Ĵuraso kaj Francio.

Tie, je la dekseca jarcento, loka kastelano bezonis akvon por funkciigi la muelilon, kiun li uzas por la tritikgrajnoj.

Tial li direktis akvan parton de *Nozon* tra kanalo nomita « *rivereto des Condemines* » laŭ la herbejoj de *Saint-Loup*, super la vilaĝo de *Pompaples*, ĝis la « *Moulin Bornu* ».

Poste tiu akvo devis flui alimaniere. La estro suden direktis ĝin tra la rokoj de *La Sarraz* irante ĝis la *Venoge*, tiel ne plu al *Nozon*.

Tial estis kreita la *Mezo de la Mondo*. Sed la loĝantoj de *Orny*, por siaj herbejoj, kaj kiuj de

Pompaples por funkciigi siajn forĝojn, direktis kanalon al ili. Tio kreis konfliktojn inter loĝantoj.

Finfine la kastelano vendis la *Moulin Bornu* al muelisto, kiu konstruis basenon - kiun oni vidas ankoraŭ nuntempe - por ĉesigi la kverelojn.

La malnova nomo de "Bornul" signifas samtempe la fontanajn tubojn "Bornels" kaj la limŝtonon inter *Pompaples* kaj *La Sarraz*.

David Buhlmann

Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin
ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne

sekretario@eo-l.ch
+41 21 647 29 28
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com/esperantolausanne
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

Komitato 2019

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto; Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

La komitato informas:

Nia programo aperas en <https://eventaservo.org/o/LES>

Babiladaj Rondo ambaŭgrupe:

Vendrede, la 24-an de januaro
je la 19-a, Maryse Tissot invitos
nin siahejmen en 1800 Vevey,
route de Saint-Légier 20a
079 408 71 76

🍷🍷🍷🍷🍷

Vendrede, la 7-an de februaro
je la 19-a, Francisko invitos nin
siahejmen en Lauzano,
Vallombreuse 14
079 411 14 55

🍷🍷🍷🍷🍷

Vendrede, la 21-an de februaro
je la 19-a, Knud k. M.-A. invitos
nin siahejmen en Montreux,
Av. des Alpes 150
079 210 97 75

Ĝenevaj renkontiĝoj:

22-a Kasta-Festo

Sabate, la 29-an de februaro
je 18h., rue de Montbrillant 20
Familio Sans 022 349 01 86
1001bornes@gmail.com

🍷🍷🍷🍷🍷


Lunda Grupo

ĉiuj lundoj je 18h. por babili
Restoracio *Le Galicia*, rue des Gares 21
charmiam.common@orange.fr

🍷🍷🍷🍷🍷

Inventista Ekspozicio en Ĝenevo

Dum la asembleo, ni parolos kaj decidos ĉu esperanto ĉeestos - perstande - en la **Internacia Ekspozicio de la Inventistoj** en Palexpo – Ĝenevo, de la 25-a ĝis 29-a de marto.



HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

- Atentu, —, eki; 6. Likvo fluanta en la arterioj (akuzativo); 7. Atentu, pretu, —; 8. Ankaŭ Konata Kiel;
- Dura lego, — lego; 11. Simbolo por astato je kemio;
- , pretu, eki; 14. Tempo sen suno.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

- de cigaredoj; 2. simbolo por radono je kemio; 3. Plej forta, ekstrema; 4. — kaj fugo (Bach); 5. Sanktoleuli;
- La — de Januaro estas la Epifanio (akuzativo); 10. La numero post 9; 13. Konsonantoj de unito.

Tre feliĉa estis Karlo, ĉar li havis veran amikon. Lia nomo estis Janko. Li estis tre altkreska kun nigraj haroj kaj brunaj okuloj. Nur ses monatojn pli aĝa ol Karlo li estis, tamen ĉiuj respektis lin en la klaso pro lia kuraĝo. Efektive nenion li timis kaj li estis plej lojala kaj malkaŝema knabo.

Iam la profesoro de geografio, vidante, ke li oscedas ĉiumomente, lin demandis: "Janko, ĉu vi enuas tie ĉi?" — "Jes, Sinjoro, tre multe," li respondis. Forpelita li estis, sed nur por unu horo.

Janko bonege desegnis kaj ankaŭ pentris. Li havis plej mirindan talenton por prezenti tute precize ies fizionomion per kelkaj krajonaj strekoj, kaj li desegnis en sia kajero la vizaĝon de ĉiuj siaj amikoj. Ke preskaŭ ĉiuj profesoroj ŝatis Jankon, estis facile rimarkebla, kvankam ili ofte ŝajnis lin timi.

Karlo lin samtempe amis kaj respektis. Li ĉiam

klopodis esti apud li kaj lin sekvadi. Li tre bedaŭris, ke li ne povas sidi en la klaso apud Janko, kvankam Man estis afabla najbaro. Karlo tre ofte alvenis hejmen malfrue post la fino de la posttagmezaj lecionoj. Kiam lia patrino demandis lin: "Nu, Karlo mia, kion vi faris tiel longe?" — "Mi akompanis Jankon," estis lia ĉiama respondo.

Janko sciis tiom da aferoj! Li estis vera scienculo, kaj Karlo opiniis, ke li jam instruis lin multe pli ol la lecionoj en la liceo. Tamen Karlo ĉiam sentis sin nesciulo apud li, sed Janko neniam mokis lin pri eraro aŭ nescio. Karlo opiniis, ke tio estas pruvo de senfina delikateco en la karaktero de lia amiko.

Estis vera honoro tiel esti protektata de Janko, kaj fiere Karlo ĝuis ĝin. Al Janko li diris ĉiujn sekretojn siajn kaj petis konsilojn en ĉiu

embarasanta okazo. Kiam Karlo faris al li demandon pri malfacila afero, li kelkafoje diris: "Mi respondos al vi morgaŭ." La morgaŭan tagon, sen ia forgeso, li alportis plenan informon pri la afero.

Lia patro estis presisto kaj havis grandegan librejon. Kelkafoje Janko pruntis librojn al Karlo kaj eĉ al aliaj knaboj, sed sur la unuan paĝon li ĉiam metis antaŭe per kaŭĉuka stampilo sian nomon kaj la jenajn versojn de fama poeto:

*"De pruntita libro jen la nepra sorto:
Ofte ĝi perdiĝas, ĉiam difektiĝas."*

Pro sia kontraŭema karaktero, la knaboj preskaŭ ĉiam redonis la librojn en sufiĉe bona stato.

En somero, dum la libertempo, Janko kaj Karlo faris multajn ekskursojn, ĉu piede, ĉu biciklete, kaj ĉiam pligrandiĝis ilia amikeco.

Anstataŭi la streketojn per taŭgaj vortoj.

- Ĉu Janko estis multe — aĝa ol Karlo? 2. Kion demandis la — de geografio? — *demandis: Janko, — vi enuas — ĉi?* 3. Ĉu Karlo estis — de Janko? *Ne, — ne — najbaro de —.* 4. Ĉu Janko — sciis? *Jes, Janko estis — scienculo.* 5. Kion — Karlo al Janko? *Li diris siajn* 6. Ĉu Janko ĉiam tuj — la demandojn? *Ne, — li respondis la morgaŭan —.* 7. Kion faris la — de Janko? *Li estis —.* 8. Kiu viro — la presarton? *Gutenberg elpensis la —.* 9. — publika biblioteko — via urbo? *Jes, en — urbo estas unu — biblioteko.*

Intervjuo de Françoise Petermann, Kasisto de LES

(Fare de Francisko)

- *Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfaze.*

Kiel la Konfederacio Helvetika, mi naskiĝis la 1-an de aŭgusto ... tamen en 1955 sur la « Röstigraben » ... en Bielo. Mi nur « provis » paroli la alemanan en la Infangardeno. Mia studado okazis franc-lingve. Post mia edziniĝo ni foriris 2 jarojn en Maroko. Revenante en Laŭzano mi studis en la Sociala kaj Pedagogia Lernejo antaŭ foriri 2 jarojn al Kongo.

- *Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

La onklino de mia patrino - Alice Matzinger – estis esperantistino en La Chaux-de-Fonds sed mi ne interesiĝis pri esperanto tiuepoke.

- *Kiam vi decidis studi esperanton?*

En la radio mi aŭskultis Francisko-n paroli pri la lingvo de mia praonklino. Tuj mi kontaktis lin, ĉar mi decidis studi esperanton kiel defio de mia 50jaraĝo.

- *Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

Ĉiuj kompatis pensante, ke tiu studo malutilas. Male mia patrino ĝojis pri tiu ideo.

- *Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

Neniu sekvis mian iniciaton. Eĉ mia patrino diris, ke ŝi tro maljunas por studadi.

- *Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

Kiel multaj mi trajne vojaĝis tra Siberio irante al la UK de Seulo (2017 / Koreio). Estis mia unua kongresa sperto.

